ILEI raportas

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro pri trimonata agado, de 2016-07-15 ĝis 2016-10-15.

Eventoj

La Prezidanto Mireille Grosjean akiris konsenton de la familio La Torre por duan fojon lanĉi baldaŭ la Premion Mauro La Torre. Komence de septembro ILEI kunlabore kun la familio La Torre anoncis la konkurson pri esplor-laboro en unu el la kampoj, en kiuj laboris la karmemora Prezidanto de ILEI, profesoro Mauro La Torre (1946-2010). La detala alvoko kaj la regularo aperas en la paĝaro de ILEI kaj de edukado.net.

ILEI subtenos Internacian sciencan Esperanto-rumanan kolokvon ESPERANTO - PONTO INTER LINGVOJ KAJ KULTUROJ (11-12 novembro 2016, Timişoara, Rumanio). Por tiu aranĝo la estrarano Radojica Petrović preparis prelegojn kaj literaturan atelieron. Mireille Grosjean preparis prelegon, kiu estos surloke laŭtlegita.

Daŭris densa kaj aktiva preparado pri la okazigo novembre en Ĉinio de la 5-a ISOA (ILEI-Seminario en Orienta Azio) deflanke de la vicprezidanto Prof. D-ro GONG Xiaofeng (Arko) kunlabore kun la Prezidanto Mireille Grosjean, kiu partoprenos.

Kapabligo

Aŭguste ILEI diskonigis la fakton, ke ĝi subvencios 5 personojn por la unujara Instruista Trejnado en UAM, Poznan, Pollando. ILEI ricevis 7 petojn por kandidatiĝi por tiu stipendio. Kune kun Mag. D-ro Ilona Koutny la Estraro pridiskutis 5 kandidatojn por subvencii ilian studadon. Komence de septembro okazis voĉdonado. Ĉiuj elektitaj kandidatoj estis informitaj pri la subvencioj. Danke ankaŭ al tiu subvencio la kvanto de studentoj en UAM ĉi-jare estas rekorda.

La Estraro pridiskutis la venontajn ekzamen-sesiojn de ILEI-UEA kun Karine Arakeljan, la Prezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK). Sesio en Togolando aŭguste devis esti nuligita pro funebro ĉe unu el la organizantoj lokaj. Sesio okazos en decembro en Bunda, Tanzanio, okaze de la sesa Afrika Kongreso de Esperanto.

Kadre de la 8-a Azia Kongreso de Esperanto komence de novembro okazos KER-ekzamenaro en Ĉinio, kiun aktive organizas la vicprezidanto Prof. D-ro GONG Xiaofeng (Arko).

Okaze de la estrarkunsido post la 49-a Konferenco la Estraro de ILEI ricevis detalan priskribon pri la projekto de la germana sekcio de ILEI kaj la germana Landa Asocio por krei senpagan retejon por lertigi geinstruistojn. La respondeculino de la projekto Zsófia Kóródy respondis abundajn demandojn de la estraranoj. Espereble dum 2017 tiu projekto eniros publikan fazon.

Ankaŭ la Estraro pripensas pri gvidlinioj rilate al kreado de propra kapablig-agado.

Jaro de la LERNANTO (JdL)

Daŭras sukcesa kunlaboro de UEA kaj ILEI pri JdL kadre de la kreita laborgrupo. La slogano por ĝi iĝis: io nova ĉiumonate! Jen la unuaj rezultoj en realigado de tiu Jaro.
Julie dum la UK aldoniĝis novaj anoj al la laborgrupo por JdL kaj ĝi komencis realigi la planitan agadon. Bone pasis la Tago de Lernado dum la Universala Kongreso, kiu temis ankaŭ pri JdL. La du Prezidantoj de UEA kaj de ILEI oficiale lanĉis la Jaron.

En la juli-aŭgusta numero de la revuo *Esperanto* aperis granda artikolo pri JdL kun prezento de ĝia programo, realigata kunlabore inter UEA kaj ILEI.

Aŭguste la Prezidanto Mireille Grosjean kreis grupon en Facebook-paĝaro por JdL: https://www.facebook.com/Jaro-de-la-Lernanto-530265400493830/ kaj dissendis alvokojn al la sekciestroj kaj tra aliaj dissendolistoj de ILEI sekvi la agadon de JdL.
Septembre aktive prepariĝis la filmkonkurso kadre de Jdl. Ĝi havas la nomon IPEFF – Internacia Pedagogia Film-Festivalo. Estis ellaborita deflanke de la Estraro regularo por la konkurso, kreita internacia ĵurio el 7 personoj. Ĝi inkluzivas tri profesiajn filmistojn, ankaŭ ne-esperantistajn. La informo kaj alvoko por la konkurso aperis en EKO. Komence de oktobro la Estraro lanĉis la konkurson kaj dissendis la alvokon por disvastigi la informon tra diversaj kanaloj.

Novembre la Prezidanto partoprenos KAEM-kongreson kaj ISOA- seminarion kaj reflugos rekte al Nederlando por esti en la Centra Oficejo fine de novembro. La temo de la Malferma Tago en la Centra oficejo (02-06.11.2016) estos la Jaro de la Lernanto. La anoj de la laborgrupo por JdL – La Prezidanto de ILEI Mireille kaj la vicprezidanto de UEA Stefan MacGill – kune preparas la seminariojn pri la JdL por la Malferma Tago en la Centra Oficejo kaj por la 8-a Azia Kongreso de KAEM, Komisiono por Azia Esperanto-Movado, de UEA.

Auxtune komenciĝis laboro pri reeldono de *Manlibro* pri instruado de Esperanto. La redaktoro de edukado.net Katalin Kovats konsentis kunlabori pri la enhava aspekto de tiu nova eldono. Germain Pirlot, Belgio, konsentas subteni ŝin.

Estis planataj ankaŭ iuformaj aktivaĵoj pri JdL dum la internaciaj E-aranĝoj: la Novjara Renkontiĝo NR en Saarbrücken, Germanio, kaj la kongreso de la Fervojistoj, IFEF en Colmar, Francio.

E-centroj

La preparlaboroj por esploroj pri E-centroj survojas. Dum la UK kaj la ILEI-konferenco okazis kunsido kaj seminario konforme al tiu UEA-ILEI-projekto. Oni diskutis pri diversaj aspektoj de tiu temo kaj pri la planata esploro.
La demandaro estis finpreparita. Septembre estis lanĉita la kreado de la retejo por E-centroj. Anoj de la laborgrupo aktive kaj efektive kunlaboris pri tio. La respondeculo pri E-centroj ĉe la Estraro de UEA LEE Jungkee trovis fakulon por krei retejon kaj monon por lanĉi la aferon. La anoj de la laborgrupo pridiskutis la manieron por dissendado de la enketilo. Nun daŭras la konstruado de la enhavo de la paĝaro kaj teknika prilaboro. Jam estas salutvortoj de la Prezidantoj de UEA kaj de ILEI, aliaj salutoj survojas.
La Prezidanto Mireille Grosjean renkontiĝis kun D-ro Bernhard Tuider, la respondeculo pri la Kolekto pri Planlingvoj en Vieno, Aŭstrio, kaj priparolis pri la ILEI-projekto "Ni Savu Niajn Semojn", pri la biblioteko en Ĉinio kaj pri la leĝaj bazoj de tiaj institucioj. Ankaŭ La komuna pripenso UEA-ILEI pri E-centroj venis en la temaron. Estis komparitaj E-centroj en Vieno kaj en La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Vivo de la Ligo

Septembre la Estraro ĝustigis la liston de novaj komitatanoj.
Estis elektitaj du novaj membroj de la Elekta komisiono de ILEI (anstataŭ tiuj, kiuj ne plu membras en la Komitato): Rob Moerbeek kaj Zsófia Kóródy.

Ankaŭ estis elektita la komisiito de ILEI pri la kontribuo de ILEI en UK, kiu prizorgos la Tagon de la Lernado, aperon de ILEI dum la Movada Foiro kaj la deĵorplanon en la ILEI-budo. Temas pri Marija Belo'sevi'c el Kroatio.

Oktobre estis organizita reta voĉdono por aprobi la protokolojn de la komitat-kunsido en Nyíregyháza, Hungario. Komence fare de la Estraro, en la dua fazo fare de la Komitato.

Konferencoj

Bone sukcesis la 49-a kaj la lasta ILEI-Konferenco en Nyíregyháza, Hungario.
Dum plena jaro la estrarano pri konferencoj Radojica Petrović okupiĝis pri kunordigado de la konferenca programo en Nyíregyháza kunlabore kun la aliaj estraranoj kaj LKK. Dum la la dua duono de Julio kaj dum la konferenco ĉiuj estraranoj estis plene okupitaj per organizado de diversaj konferencaj programeroj kaj aliaj bezonoj.

Post la Konferenco ĉe la paĝaro www.ilei.info, en diversaj revuoj kaj aliaj E-kanaloj aperis multaj artikoloj kaj informoj pri tiu evento. Deflanke de la Prezidantino estis kompilita vasta analiza statistiko ne nur pri la lasta, sed ĝenerale pri ILEI-konferencoj /kongresoj laŭ la diversaj kriterioj (loko, temo, lando-gastiganto, ofteco en la sama lando, ligo kun UK k.a.)
Septembre la estrarano pri konferencoj Radojica Petrović preparis materialon pri la 49-a ILEI-Konferenco por la revuo *Esperanto* kunlabore kun ĝia redaktoro. Elena Nadikova preparis artikolon por *Juna Amiko* kaj *Bulteno de REU* (Rusia Esperanto-Unio). Aperis ankaŭ materialo en *La Ondo de Esperanto*.

Septembre komenciĝis la kolektado de konferencaj prelegoj por publikigo.

ILEI ricevis dankleteron de Adjévi Adjé el Togolando, kiu la unuan fojon partoprenis la 49-an Konferencon en Nyíregyháza pere de subvencio de la Ligo.

Venontaj Konferencoj-Kongresoj

Dum la ferma ceremonio de nia ILEI-Konferenco estis anoncitaj loko kaj tempo de la sekva ILEI-jam-kongreso en Busano, Sud-Koreio, 15-22 julio 2017.
Aŭguste - septembre vigle pasis preparado de la 50-a ILEI-Kongreso en Koreio en 2017 sub la gvido de la estrarano pri Kongresoj Radojica Petrović kunlabore kun la koreia sekcio de ILEI sub la gvido de la sekciestro Sinjoro Park “Nema”. En la paĝaro de ILEI www.ilei.info jam aŭguste estis enmetitaj la bazaj informoj pri la Kongreso-2017 (fare de la prizorganto Jozefo Nemeth) kun foto de templo en Busano. ILEI kaj LKK pripensas ankaŭ pri la logotipo de la sekvonta kongreso. La Prezidantino Mireille Grosjean fine de auxgusto kreis FB-paĝon pri la Kongreso de ILEI en 2017 en Koreio https://www.facebook.com/groups/158807324552503/?fref=ts Tie ŝi aperigis la oficialan lanĉon de la 50-a ILEI-KONGRESO 2017 en du lingvoj kun mencio de la koreaj sponsoroj.

Aŭguste-septembre la Estraro pridiskutis la dividon de taskoj inter la estraranoj kaj ĝenerale por preparado de la ILEI-Kongreso en Busano en 2017. Okaze de la skajp-kunsido la 24-an de septembro okazis akcepto kaj plenumado de tiu taskar-

listo. Ĉiuj estraranoj elektis proprajn kampojn/fakojn por bona organizado de la sekvonta ILEI-Kongreso. Sekvos la ekkunlaboro kun eksterestraraj fortoj.
La Prezidantino havos la okazon en novembro en Ĉinio pritrakti kun KAEM la eblon subteni la alvenon de diversaj personoj el diversaj landoj al Koreio en 2017 por la UK kaj ILEI-kongreso.

Fare de la estrarano pri Kongresoj Radojica Petrović komenciĝis kontaktoj kaj prisonda demandaro pri ebla okazigo de la 51-a Kongreso de ILEI en Hispanio, 2018, sciante, laux la informo, ke la UK okazos en Lisbono, Portugalio.

Komisionoj, sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpresonoj

Okazadas diskutoj kun UEA pri la ILEI-Komisiono pri universitata agado. Tia agado estas grava. UEA kaj ILEI esploras por trovi motoron por tiu agado.

Daŭris la komunikado inter la Estraro kaj la Ukraina-sekcio de ILEI pri ĝia situacio. Dum la 101-a UK en Nitra la Prezidantino Mireille Grosjean pritraktis la situacion en la Ukrainia-sekcio de ILEI kun la reprezentantoj de la Ukraina Esperanto-Asocio. Poste ILEI aprobis la revenon al la antaŭa stato pri la mastrumado de la sekcio en Ukrainio. La sekciestro estas Prof D-ro Nina Daniljuk.

Ĉina Ligo de Esperantistaj Instruistoj subgvide de la vicprezidantino Prof. D-ro GONG Xiaofeng (Arko) aktive preparas du mondskalajn eventojn: la 5-an ISOA-n (ILEI-Seminarion en Orienta Azio) kaj la KER-ekzamenon kadre de la 8-a Azia Kongreso de Esperanto, kiuj ambaŭ okazos paralele la 3-6-an de novembro 2016, en Quanzhou, sudorienta Ĉinio.

La Estraro sekvas la disvolviĝon de la anoncita enkonduko de Esperanto en ĉiujn lernejojn en Burundo. La informoj estas iom kontraŭdiraj kaj la Estraro esploras ilin nun por kompreni la situacion kaj akiri veran imagon pri la afero. Tio necesas por ellabori adekvatan strategion por efika kunlaboro kun la Landa Asocio ANEB kaj la loka ILEI-sekcio. Povis okazi rekta parolado pri tio inter la Prezidanto de ILEI kaj la Prezidanto de ANEB Jérémie Sabiyumva okaze de la seminario de TEJO en Kotonuo komence de oktobro.

Estraro

Tuj post la 49-a konferenco en Nyíregyháza okazis 3-taga estrar-kunsido. Ĝin partoprenis 6 el 7 estraranoj kaj observantoj de UEA kaj TEJO. Estis la dua fizika estrar-kunsido por la Estraro, novelektita en 2015. Estis pridiskutitaj kaj deciditaj gravaj aferoj en la vivo de la Ligo.

Septembre okazis du skajp-kunsidoj de la Estraro. Inter la ĉefaj demandoj estis la 50-a ILEI-Kongreso en Busano unuavice, realigado de la Jaro de la Lernanto, la programo de ILEI “Ni savu niajn semojn” kaj diversaj internaj eventoj, bezonoj, farendaĵoj k.a. Dum la dua septembra skajp-kunsido estis aprobita modifita repagreglamento de ILEI, kiu ĝis tiam estis diskutita kaj voĉdonita laŭ la reguloj de la Ligo.

La Prezidantino Mireille Grosjean sendis salutvorton al la partoprenantoj de TORPEDO-2017, okazanta en oktobro en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz, Germanio. Kaj gratulmesaĝon al la Interlingvistika studsesio en UAM, Poznan. La kvinan de septembro okazis la Tago de Instruistoj en Barato; la Prezidanto sendis salutvortojn.

Internacia Pedagogia Revuo (IPR)

La Estraro kondolencas rilate al la morto de Detlev Blanke el Germanio. Li estis korifeo kaj nepra referencpunkto en interlingvistiko. En IPR estis publikigita nekrologa artikolo. Same ni dediĉis kelkajn liniojn al la elstara laboro de la forpasinta Paul Gubbins el Britio.

Komence de oktobro aperis reta varianto de IPR 2016/3. Poste survojis la papera. En la 3-a numero aperis priskribo de la plej granda sekcio de ILEI – la ĉina – kun teksto kaj fotoj, preparita de la vicprezidanto Prof. D-ro GONG Xiaofeng (Arko) . Tiu materialo estis inter la aranĝoj kadre de la Jaro de Lernanto.
Jam pariĝas la 4-a numero danke al sindona laboro de Jozefo Nemeth. Ĝi estos farata sur pli ekologia papero kaj en alia pressistemo. Tio ebligos eviti aldonajn elspezojn por IPR. Tio okazas laŭ la decido de la Komitato.

Juna Amiko (JA)

La Prezidantino Mireille Grosjean publikigis en Facebook en la grupo “ILEI labortable ” anoncon pri la nova eblo aboni rete la revuon *JA*.

En preparo estas *JA* - 148. Antaŭ la jarfino aperos la numero 149. Jam okazas preparoj por la festa numero 150, kiu aperos komence de 2017.

ILEI en la Reto

La Prezidantino Mireille Grosjean diligente kaj senĉese plenigas la kreitan grupon en la Facebook-paĝaro «ILEI labortable - ILEI desktop», publikigante tie novaĵojn pri JdL, alvokojn, fotojn pri la aktualaj okazaĵoj ene de la Ligo.

Kunlaboro kun UEA

Laux la planoj disvolviĝas du ĉefaj komunaj projektoj de UEA kaj ILEI – Jaro de la Lernanto kaj esploro pri E-centroj.
Komence de oktobro en vica numero de EKO (28) aperis anonco pri la 'Internacia Pedagogia Film-Festivalo de ILEI' kadre de JdL, kiu enhavis detalan informon ankaŭ pri la konkurso..
Oktobre ILEI kiel Faka Asocio de UEA ricevis la bezonatajn dokumentojn por partopreni la Ĝeneralan Voĉdonon de UEA pri statutŝanĝo de la Universala Esperanto Asocio.

Kun TEJO

En la estrarkunsido, kiu sekvis la Konferencon en Nyíregyháza partoprenis la reprezentanto de TEJO Michal Matusov. Abunda ideointerŝanĝo estis tre bonvena. Venis propono de la Prezidanto de TEJO pri komuna kunsido inter la Estraroj de TEJO kaj ILEI antaŭ la ĝenerala voĉdono en UEA pri statutŝanĝo. La afero estas pritraktata.

La estrarano pri konferencoj Radojica Petrović komencis pritrakti kun la Estraro de TEJO kunlaboron de la du organizoj por ILEI-kongresoj (deflanke de TEJO) kaj por IJK (rilate al junulara programo).

Kontaktoj kun ekstermovadaj institucioj

La 18-an kaj la 19-an de septembro en Suda Koreio, en la urbo de la ILEI-kongreso-2017 Busano, okazis Konferenco de UIA (Unio de Internaciaj Asocioj – angle: Union of International Associations). Ĝin partoprenis tri koreaj esperantistoj nome de UEA kaj ILEI, inter ili, la sekciestro de la korea ILEI-sekcio PARK Youngsung (Nema). Ili disdonis flugfoliojn pri Eo al la ĉeestantoj.

La kandidatiĝo de ILEI ĉe UNESKO sendita la 14-an de januaro 2016 ankoraŭ ne ricevis respondon.

Kontaktoj kun enmovadaj institucioj

La estrarano Radojica Petrović nome de ILEI kiel ĝia reprezentanto partoprenis en planado de la projekto de Interkant, la fama Esperanto-koruso, kaj la Kulturdomo

Grésillon pri muzik-teatra spektaklo pri ekesto kaj evoluo de Esperanto. ILEI estos partnero en tiu projekto, Krome, li preparas la Renkontiĝon de Esperantistaj Familioj REF - 2017 en Serbio, kiun ILEI pretas aŭspicii.

Dankoj

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo ricevu elkorajn dankojn.

Vicsekretario de ILEI:
Elena Nadikova
Prezidanto de ILEI:
Mireille Grosjean
2016-10-15
Kotonuo, Benino